ĉi fermilotipoj, la adekvate taŭgajn botelojn. Alumini-kapsulo montras al la konsumanto la nedamaĝitecon kaj ebligas la senhelpilan malfermon de la botelo.

La natura korko do ricevis grandan konkurencantaron, kiu tamen ne vere malutilis al la vinkulturo. Altkvalitaj pintvinoj ankaŭ estonte estos enboteligataj per kvalite altvaloraj naturkorkaĵoj – almenaŭ tiom longe kiom ekzistas kaj estas vivtenataj la korkokverkoj (*Quercus suber*). Ĉiuokaze, ĉe la serĉado por alternativaj ŝtopiloj por vinboteloj prezentiĝas multaj bonkvalitaj elirvojoj.

(*Werra-Rundschau*, 2009-02-12)

Falanta eŭro

Ĵeti moneron de multetaĝa domo ne kaŭzas danĝeron por korpo aŭ eĉ morton al surstrata preterpasanto aŭ tie sidanta almozulo. Tio ne dependas de la pezo de la eŭro-monero, sed de ĝia ne vere elegantŝvelta formo. Moneroj turb-rotacie falas kaj estas, dumfluge, forte bremsataj. Laŭgrande kaj laŭ la denseco de la materialo ili alvenas teren je rapideco inter 30 ĝis 50 kilometroj en horo. Tio ne sufiĉas por seriozaj lezoj. Por trabati oston estas necesa falorapideco de inter 200 kaj 300 km/h.

Tute alia afero ĉe pafaĵoj ekĵetitaj el pistoloj aŭ fusiloj. Ili estas – pro la flugstabileco – aerodinamike formitaj. En mondoregionoj, kie oni esprimas sian ĝojon per pafoj en la aeron, jam mortis homoj pro reen al la tero falantaj pafaĵoj.

Se vi ne timas la kostojn, vi do trankvile kaj senpripense povas ĉirkaŭĵeti monerojn. (2010-02-10)

La "germanuja" *Counter* ree iĝos "giĉeto"

Germanlingve ekzistis giĉetejo kun giĉeto (*Schalterraum mit Schalter*) – ĝis la uson-anglismo preskaŭ ĉie anstataŭis la delonge uzitajn vortojn tradiciajn. Esprimoj – duon-angle/duon-germane kaj ofte ne plu deĉifreblaj – svarmas en nialandaj negocejoj kaj negocegoj, hoteloj kaj publik-administraj ejoj.

Ene de la federaci-germanaj fervojinstalaĵoj kaj stacidomoj oni nun planas, estonte uzi malpli da anglaj esprimoj. Tion certigis la fervojestro *Rüdiger Grube* per letero al la CSU-parlamentano *Ernst Hinsken*, kiu plendis pri la apliko de la nocio "*Kiss & Ride*" (t.e. "Kisu kaj ekveturu") por (de li proponita) mallongtempa parkeblo por aŭtomobiloj ĉe la stacidomo de la malaltbavara urbo *Straubing*. S-ro *Grube* signalis komprenon por la forta obĵeto de la kristandemokrata politikisto. Legiĝas en la letero, ke la entrepreno akcepte ekkonis la argumenton kaj intertempe jam eksplicite rekomendas la rezignon pri anglismoj. Sekve, ekde meze de januaro, la broŝuroj kaj komercaj korespondaĵoj de la Germana Fervojo ne plu nomiĝas "*Flyers*" ("flugantoj") sed simple "inform-broŝuroj", revenos anstataŭ "*Counter*" la olda "giĉeto", elstaraj servoj ne plu estos "*Highlights*" kaj el "*Hotlines*" fariĝos "servonumeroj".

La apudstacidoma servo "*Call-a-Bike*" ("Voku biciklon") estonte iĝos "Lupren-biciklo de la Germana Fervojo" kaj ankaŭ la "*Kiss & Ride*"-ejo estos sufiĉe bone markata per "kurtparkejo". Tamen el la celata reveno al germanaj vortoj esceptos, laŭ *Grube*, la jam instaligitaj markosimboloj kiel ekz. "*Bahncard*" ("trajnbileto") aŭ *Intercity* ("interurba trajno").

(*Hersfelder Zeitung* n-ro 40 de 2010-02-17, p. PÖ-1)

Interreta ".tv"

Kie oni "alteriĝas" kun tiu ĉi adreso? Fakte, jes, fakte oni alvenos kun ĝi en *Tuvalu*, insula ŝtato konsistanta el 9 atoloj oriente de Papuo-Novgvineo. Ĝi estas 26 km^2 granda (ĉirkaŭ kvarono de la insulo *Sylt* antaŭ Danlando kaj Germanujo) kaj kun nur 12 000 homoj la plej malpli loĝata lando de la Tero. *Tuvalu* estas bela, malriĉa kaj minacata de la plialtiĝanta marnivelo.

Por reprezenti la urĝan peton de la Internacia Klimatoprotekto antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj la insulanoj bezonis monon. Tial ili forvendis sian nacian interret-adreson ".tv" por 50 milionoj da usonaj dolaroj al iu utilig-asocio. Tiu denove ruze enkasigis ĉe radiostacioj, televid-entreprenoj kaj privataj personoj, kiuj volis ornami sin "*online*" per tiu ĉi ŝika kaj ekstreme laŭmoda mallongigaĵo (ekz. "viva.tv" aŭ "mtv.tv").

Ĝis nun jam pli ol miliono da tiaj .tv-almetaĵoj estis fordonitaj. Tio tutcerte kostas 100 000 da dolaroj, eĉ pli. Kiam vi, kara leganto, bezonas ion tian: do, simple enretigu laŭ *www.tv* (2010-01-28)